

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazis

([KK])=nia kutima kunveno, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

***jan. 27 [KK] Ĝenerala Jarkunveno de NPO Esperanto Jokohamo**

El 54 membroj, 19 ĉeestis kaj 19 mandatiloj venis. Oni kontrolis agadraporton kaj kason de la jaro 2018. Pri la esperantigita versio de agadraporto, legu la Jarkajeron en la sekvantaj paĝoj. Kaj ni fiksas planon kaj buĝeton de la jaro 2019. La estraranoj renoviĝis: ekŝiĝis s-ro Doi Hirokaz kaj s-ino Doi Ĉieko, kaj nove eniris en la estraron Akiya Hideo. Tial niaj nunaj estraranoj estas jenaj:

(estraranoj)

Sibayama Zyun'iti (la prezidanto)

Miyazaki Hideko (la vicprezidanto)

Akiya Hideo

Fuse Kentaro

Namba Fumiharu

(revizoroj)

Karibe Riichi

Tanigawa Hiroshi

***feb. 3 [ĉambro en la Domo de JICA] Prelego**

Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis 100-minutan prezenton pri nia lingvo. S-ino Miyazaki Hideko prelegis "Kial Esperanto nepre estos elektota kiel internacia lingvo", kun prezento de la ideoj de Zamenhof, ktp. Poste okazis lingva prezento fare de Fuse Kentaro. Entute 16 venis, inkluzive de niaj membroj kaj amikaj esperantistoj.



Niaj Planoj

***feb. 9 - mar. 16 [KK]** Rudimenta kurso de Esperanto, en 6 fojoj.

Poste ankaŭ en aprilo - majo, ni planas havi kurson.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

***Regulaj Klasoj en sabato**

(1) Klaso "Eseoj", por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj" de Tibor Sekelj, 1 fojon – libera verkado; kaj alian fojon – tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

***Regulaj Klasoj en merkredo**

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "eriko", por legi "Utila Estas Aliĝo" gvidate de Doi Ĉieko

***Neregula Klaso**

Klaso "Belflora": por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate

Jar-kajero 2018

Sibayama Zyun'iti, la Redaktoro

Mi skizas la ĉefajn eventojn okazintajn en 2018 en nia Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama.

noto: mallongigo por la kunvenejoj: [KK]: nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa] en Jokohamo.

*jan. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun prelego de s-ro Jamaŝita Toŝihiro el Kagoŝima, pri “Kiel lerni Esperanton per lerta telefono”, kaj de s-ro Glauco Pompilio, pri “Miaj memoroj pri prof. Ivo Lapenna”. Ĉeestis 15.

*jan. 28 [KK] La 4-a Jarkunveno de la rondo por buĝeto, planado, estraro ktp. Ĉeestis 16 personoj kaj estis 36 mandatoj, kompare al 59 plenrajtaj membroj.

*feb. --- Ni eldonis la 2an eldonon de la “Karlo”, legolibro de Edmond Privat kun paralela traduko japana kaj glosaro, de Mevo-Libroj (eldonejo de NEJ).

*feb. 4 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis 2-horan prezenton pri la rezulto de la lernolibro-kolektado kaj klarigo pri Esperanto. 7 el ni kaj ĉ.10 civitanaj aŭskultantoj estis.

*feb. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero pri “Hamalogio 1” (studo pri Jokohamo) . Estis 3 prelegoj: de Namba Fumiharu pri “Per akvo - Interrilato

inter Jokohamo kaj iu vilaĝo”, de Sibayama Zyun'iti pri “Tokaido, fervoje kaj piedvoje”, kaj de Suzuki Keiichiro pri “Biero en Jokohamo”. Ĉeestis 16.

*mar. 3 [KK] 110-a Legokunsido pri “La viro el la pasinteco” de Julian Modest. 4 partoprenis.

*mar. 10,11 [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj, de la grupoj, kiuj uzas KK kiel kunsidejon. Per komputila projekciado, s-ro Namba Fumiharu prelegis laŭ la temo “Esperanto estas ja Minato-Mirai (t.e. Haveno Estonto)”; Minato-Mirai estas relative nova urba distrikto en Jokohamo, pri kies evoluo Namba vidis

similecon kun Esperanto.

*mar. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero pri “Hamalogio 2” (studo pri Jokohamo) . Estis 3 prelegoj: de Saguchi Yuko “Pri la historio de lerneja tagmanĝo en Jokohamo”, de Tanigawa Hiroshi pri “Kotobuki-ĉoo aŭ simple ‘Kotobuki’” kaj de Doi Ĉieko pri “Historio de Esperanto-



Prelegas s-ro Tanigawa Hiroshi.

movado en Kanagavo”.

*apr. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero por antaŭlerna Portugalio, la lando de la 103-a UK, okazis prelegoj: de Akiya Hideo japanlingve pri portugala historio, de Namba Fumiharu pri portugala fervojo (cetere li fakte veturis multe en la UK kaj poste), de Miyazaki Hideko pri portugala lingvo, kaj de Doi Ĉieko pri la historio de Esperanto-movado en Portugalio.

*maj. 1 ĝis maj. 7 [Galerio C en Minato-Mirai] foto-ekspozicio pri Internaciaj Amikecaj Agadoj, t.e. per Esperanto. Ekspoziciitaj krome estas la historio de L.L.Zamenhof, Esperantaj libroj, ktp. Vizitis ĝin ĉ. 500 personoj --- inkluzive de pola esperantisto hazarde turismanta en la



urbo.

*maj. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun japanlingva prelego de Nomoto Sankichi, simpatianto al Esperanto, pri “De la nuntempo al la estonteco; kion mi esperas de Esperanto”. Ĉeestis 24.

*jun. 2 [KK] 111-a Legokunsido pri “Gvidlibro pri Jokohamo kun eseoj hamalogiaj, 2017” de Mevo-Libro. 4 partoprenis.

*jun. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun prelego de Ueno Yuriko (el Maĉida), pri “Partopreninte en la 9a TutAmerika Kongreso de Esperanto”, kiu okazis en februaro 2018. Ĉeestis 26.

★jun. 16: Forpasis nia membro, s-ro Koyama Takesi, 85-jara.

*jul. 28 [KK] Speciala klaso kun belgaj esperantistoj: S-ro Bart Demeyere kaj lia filo Thomas vizitis nian rondon, kaj Bart prezentis, unue pri sia loĝurbo, due pri komputila programo “Vivo”. Ĉeestis 11 personoj.

*sept. 1 [KK] La kunveno raporti siajn spertojn (en Esperanto). 11 parolis, dum ĉeestis 19.

*sept. 8 [KK] 112-a Legokunsido pri “La nanoj en domo kun granda zelkovo” tradukita de nia membro Itabaŝi Micuko. Partoprenis 7 personoj.

*okt. 7,8 [Parko Grand Mall en Minato-Mirai] En la Internacia Festo de Jokohamo, nia rondo havis ekspozician tendon.

*okt. 12,13,14 [en la urbo Nara] Okazis la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio (enhavanta la 105-an Japanan Esperanto-Kongreson), kaj nia rondo havis tablon por konigi nian rondon kaj vendi librojn eldonitajn

de ni. Nia kantogrupo havis plurajn okazajn kanti.



★nov. 1: Forpasis nia membro, s-ino Hirose Kanae, 80-jara.

*nov. 17 [KK] Hama-Ronda Tago (ĉar ĝi okazis de 13:00 ĝis 15:00), kiel daŭrigo de “La kunveno raporti siajn spertojn”. Parolis 6 Esperante, 1 japane, dume ĉeestis 16.

*dec. 1 [KK] 113-a Legokunsido pri “Kie miozotas memor’” de Ed Borsboom. 4 partoprenis.

*dec. 16: Eldonis japanlingvan libron de Koyama Takesi, “Watasi no zokuzoku sekai-ryokoo”, t.e. “Miaj sinsekvaj mondovojaĝoj”, kiu priskribis sian sperton pri sinsekvaj partoprenoj en UK dum 25 jaroj de 1991.

*dec. 16 [Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco, en Jokohamo] la 48-a Zamenhof-Festo de Kanagavo. I.a. d-ro Ulrich Lins prelegis je la temo: “Antaŭ cent jaroj: esperoj pri nova mondo”. Ĉeestis entute 48 personoj. (fino)

TERanidO 2019년
Januaro(N-ro 264)

Busana Filio de Korea Esperanto-Asocio
한국에스페란토협회 부산지부 회보

La Elementa Kurso de Esperanto en Seomyeon, urbo Busan(1/22-2/26, ĉiun mardoj ptn 19:00-22:00) gvidata de s-ino Granda Kaj s-ro Masori.

Korea Esperanta gazeto prenis el ni! Verko de Doi Ĉieko citita

Busana Filio de Korea Esperanto-Asocio eldonas organon TERanidO, kaj en ties januara n-ro 2019 (n-ro 264) aperis kopiite verko de Doi Ĉieko, titolita “Nun aktivas la movado por honorigo de Verda Majo”, aperinta unue en nia januara n-ro 344 de “Novaĵoj Tamtamas”.

La Ekspozicio de Ĵomona Kulturo

kune kun Bart kaj Thomas Gemeyere, belgaj esperantistoj
 — 27a de jul. 2018, Tokio
 Prezentita en la Hama-Ronda Tago, 17a de nov. 2018,
 Tanigaŭa Hiroŝi



Bart kaj Thomas Gemeyere, patro kaj filo, tranoktis ĉe mi 26a~28a de julio. Bart estis 51-jara komputilingeniero, Thomas 19-jara studento. Informite ke unu el iliaj vojaĝceloj estas ekkoni japanajn tradiciajn kulturojn, mi decidis gvidi ilin al la Ekspozicio de Ĵomona Kulturo ĉe la Nacia Muzeo en Tokio.

Ĵomono estas la nomo de japana prahistoria epoko kiu komenciĝis je la fino de la paleolitiko, t.e. antaŭ ĉirkaŭ 13 mil jaroj, kaj daŭris ĉirkaŭ 10 mil jarojn. Dum tiu epoko produktiĝis diversspecaj argilaĵoj *tutmonde distingitaj en prahistoria epoko, la origino de la japana belo*— tiel priskribis la Ekspozicia Libro. Ĉi-foja Ekspozicio estis ege grandskala. Ĉiuj 6 ĵomonaj argilaĵoj klasifikitaj al nacia trezoro estis ekspoziciitaj.

Mi anticipe vizitis la Muzeon por prove traaprezi la ekspoziciaĵojn. Mirigis min diversspecaj diversformaj argilaĵoj; ornamaĵoj, potoj, pupoj ktp. Anglalingvaj komentarioj estis detalaj. orelgvidilo uzeblas. Mi konstatis, ke la belgaj gastoj komprenos eĉ se parte, la ĉarmon de japana prahistoria kulturo. Mi gvidis la belgajn gastojn al la ekspozicio la 27an de julio.



← 微隆起線文土器 argilpoto kun desegnaĵo de etŝvelintaj linioj, 11 000 a.K.



← 土偶・縄文のビーナス argilpupo karesnomita “Diino de Ĵomono” Fascine eleganta formo ravas nin. 3 000 a.K.



← 火焰型土器 Fajrostila argilpoto, 3 000 a.K.

遮光器土器 → argilpupo kun kontraŭsunaj okulvitroj, 1000 a.K.



Eniĝinte la ekspoziciejon Thomas jam post duonhoro ĉesigis la trarigardon kaj ekludis per saĝtelefono, sidante sur benko. Bart deziris post unu horo fini la trarigardon. Ŝajnis, ke ilin ne interesis niaj ĵomonaj argilaĵoj. Bart aludis: “*Ĵomonaĵoj estas tro primitivaj, dum oni havis en “Okcidento”, pli progresintajn kulturojn.*” Mia intenco ŝajne stumblis.



Argentinan tangon Bart ĝuis en Tokio

Anticipe mi sciis, ke Bart ŝatas danci argentinan tangon. Li instruas ĝin. Mi serĉis lokon por ke li povu ĝui “japanan argentinan tangon.” Mi trovis argentintango-halon “TANGUERA” ĉe Ginza. En la vespero de la 27a de junio li dancis, ĝuis argentinan tangon tie. Thomas diris: “*Mi vidis lin la unuan fojon tiel ĝojege dancanta.*”

Bart diris: “*Argentina tango estas sentoriĉa, sensotremiga, vera tango. La alia t.n. kontinenta tango estas tro formala.*”



“*Japanaj esperantistoj emas krokodili, aligatori, eĉ kajmani*”, diris Bart.

Mi respondis:

“*Okaze de la renkontiĝo en Jokohamo, ni jokohama-anoj ne krokodilis, nek aligatori- aŭ kajmanis.*” (fino)

↑ “japana tango” estas eleganta